# EKO 2025

**Strategio por UEA**

EKO 2025-42, Oktobro 31  Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Sume 540 KB

## Nova strategia plano por la sekva UEA mandato

Kun granda plezuro mi anoncas, ke pretiĝis la strategia plano de UEA por la jaroj 2025-2030 sub la nomo AKIRI. Vi povas konsulti/elŝuti la prezentan dokumenton en nia komitata elŝutejo aŭ rekte:

https://uea.org/l/teko/komitataj/AKIRI-Strategia-Plano-de-UEA-2025-2030.pdf


AKIRI estas frukto de plurjara kaj plurkapa laboro, ĉar konstruita sur la fundamentoj de la antaŭaj strategiaj planoj de UEA fare de Mark Fettes, Duncan Charters kaj pluraj kunlaborantoj,. Ĝi nun aperas en tiu formato valida por la nuna periodo, finprilaborita laŭ instrukcio de tiu ĉi Komitato kaj surbaze de ĝiaj rekomendoj dum la UK.

AKIRI difinas la bazojn kaj la direkton de nia Asocio por la venontaj kvin jaroj - de **“kio”** al **“kiel”** - kun klaraj prioritatoj kaj postulo por konkretaj rezultoj kaj mekanismoj por monitorado kaj taksado. Mi invitas vin ĉiujn legi la dokumenton kaj pripensi, kiel viaj propraj ideoj, agadoj kaj projektoj povas konverĝi al AKIRI kaj kontribui al ĝia realigo. AKIRI sukcesos nur per nia komuna engaĝiĝo - ĝi estas plano ne nur por la Estraro de UEA, sed la tuta Eo-komunumo. La ideo estas ne nur inspiri kaj montri direkton, sed ja unuigi niajn fortojn kaj kreskigi nian efikecon kiel movado.
Mi planas okazigi *Zoom*-kunsidon por prezenti la planon kaj ebligi diskutojn ankaŭ realtempe. Mii informos la Komitaton tuj kiam ĝi estos konfirmita. Krom al prezenta dokumento kaj tiu prezento estos aliaj rimedoj kaj okazoj plu prezeti kaj nutri la planon.

Ni kune **akiru la estontecon, kiun ni deziras.**

Fernando Maia Jr. prezidanto de UEA

## Novaj libroj kiel barometro




Okupiĝi pri fakta kolekto de datumoj de Esperanto-parolantoj sonas kiel multa laboro. Se nia celo estas montri al la mondo, ke ekzistas multaj Esperanto-parolantoj, eble ni citu kelkajn jam ekzistantajn nombrojn. Kun aliaj mi kolektas tiujn sur la paĝo

"Statistiko de Esperantujo" en Vikipedio.
https://eo.wikipedia.org/wiki/Statistiko_de_Esperantujo

Mi atentigas krome, ke por la varbado de novaj kursanoj ne estas la vere decida demando, ĉu Esperanto havas 100.000 aŭ unu milionon da parolantoj. Ambaŭ nombroj signifas por la eblaj lernantoj, ke poste ili povos trovi sufiĉe da interparolantoj :)

## La itala kongreso en retrospekto

En la aŭtuna eldono de *La Ondo de Esperanto* aperis artikolo de Ulrich Matthias pri la 91-a Itala Kongreso de Esperanto, okazinta fine de aŭgusto en Salsomaggiore Terme apud Parma. Legu ĝin ĉe https://sezonoj.ru/2025/10/italujo-7/

## Kiam mi iĝas 64 – Beatles melodio

La 64-a Kunpensigado de Esperantistaj universitatanoj okazis la 6-an de oktobro 2025. Ahmad Mamduhi, la Prezidanto de ILEI, parolis pri sia kurso pri Interlingvistiko ĉe la Universitato Espoir de Kongo. Li substrekiskiel la kursoj ekis dank' al Renato Corsetti, kiu multflanke subtenis ĝin ĝis sia forpaso. La du-semestra kurso unue baziĝis sur libro de Vera Barandovska-Frank, sed plilargigis la parton pri ekstereŭropaj interlingvoj. Ĉiuj lecionoj spekteblas en la Jutuba kanalo "Esperanto + Edukado ILEI" kaj espereble estos libro.

Bernhard Tuider prelegis pri la nove ciferecigitaj dokumentoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko kaj la pri la impresa nombro de1000 kursetoj de Eo, kiujn oni kapablis instrui tie al vizitantoj ĉi-jare. Li parolis ankaŭ pri sia instruado de Eo al studentoj de la Universitato de Innsbruck.

Venontan monaton Kimura Goro parolos pri sia kurso pri Interlingvistiko ĉe Universitato Sophia Kaj Tida Syuntaro pri siaj kursoj de Eo ĉe la Universitato de Kioto. Dennis Keefe aldone klarigos sian ideon pri poŝ-bibliotekoj.

Alessandra Madella

## Forpaso de elstara figuro de la greka esperantismo

La 22-an de septembro 2025 forpasis, en alta aĝo, **Spiros Sarafian** (1940–2025), unu el la plej gravaj grekaj esperantistoj, kies kontribuo al la disvastigo kaj kultivado de la Internacia Lingvo en Grekio estis grandega kaj multflanka. Li naskiĝis en aŭgusto 1940 en Ateno, filo de grekaj enmigrintoj el Armenio. Jam kiel gimnaziano li interesiĝis pri Esperanto, kiam li konatiĝis kun **Anakreon Stamatiadis** (1868-1964), fondinto de la greka esperantista movado. Li fariĝis lia lernanto kaj poste spirita daŭriganto, rilato kiu profunde influis lian tutan vivon. Ekde 1958 li estis membro de la **Helena Esperanto-Asocio**, kie li dum jardekoj havis elstaran agadon: li instruis Esperanton en multaj kursoj, faris prelegojn, donis intervjuojn, kaj partoprenis en la organizado de gravaj eventoj. En 1971 li fariĝis prezidanto de la **Akademio de Esperanto**, kiu samjare ricevis la nomon **Supera Lernejo de la Internacia Lingvo "Anakreon Stamatiadis"**, honore al lia majstro.

## Puraj pulmoj prosperu

En la antaŭaj numeroj vi legis la fatalan sekvon de vaporado inter junuloj.
Nun ekis la fumĉesa monato "stoptobro" laŭ kofrovorto (kunpremegita).

Mia ekskursanino Lieke Wagemaker mem sin savis el la fumbezono per memedukado. Kaj nun ŝi laŭ siaj spertoj provas liberigi ankaŭ samsortanojn. Ŝi presgis brilkoloran faldfolieton (A5-formatan) kun la teksto apud kolorfoto de ĝirafo ŝajne falanta el arbo: “Tiel malsaĝe vi ne bezonas agi kiel ĉi tiu ĝirafo! Ĉi tiu senpena kurso por ĉesi fumi vin helpas esti vi mem. Ĉesi fumi estas kvazaŭ plonĝi de la alta saltotabulo. Se vi plenumas tion bone, vi ĝue kiel fiŝo englitas en akvon; se vi misangule lanĉiĝas al la akvo, ŝajnas kvazaŭ vi trafas betonon. En ĉi tiu kurso ĉesi fumi vi lernas kiel en la ĝusta maniero vi englitas la akvon. Sen STRESO aŭ TIMO pri malkutmiĝaj ĝenoj aŭ recidivo.”
Kaj aliflanke: Bildo de vojo al bela suno en rava pejzaĝo:
“LA NOVA VOJO ĉesigi fumadon; kurso ankaŭ interreta.

Rob Moerbeek

## Nepalanoj invitas refoje

Ni prezentas al vi la broŝuron de la **15-a Himalaja Renkontiĝo**, kiu okazos en Nepalo inter la **26-a de februaro kaj la 8-a de marto 2026**. Ĉi-foje ni planas konduki la partoprenantojn al la mondfama turisma regiono **Langtang**, unu el la plej belegaj lokoj de Nepalo. Dum la renkontiĝo okazos diversaj esperantlingvaj programeroj, kiuj vivosperte riĉigos la partoprenantojn kaj samtempe stimulos la lokan movadon. La Himalaja Renkontiĝo estas aranĝo taŭga por ĉiuj aĝgrupoj: ĝi kombinas kulturajn programojn, internacian amikecon, kaj unikan naturan sperton. Ni varme invitas vin partopreni kaj samtempe kuraĝigi ankaŭ nepalajn esperantistojn.

Por pliaj detaloj, bonvolu kontakti nin ĉe: **nespa.1990@gmail.com**.
La informoj disponeblas ankaŭ en **Eventa Servo** ĉe la jena ligilo:
https://eventaservo.org/e/a22e96

**Bharat Kumar Ghimire,** Prezidanto de la Nepala Esperanto-Asocio’ nespa.1990@gmail.com

## Maratone Greziljone

Somere en la Esperanto-kastelo Greziljono okazis la 9-a Maratona Esperanto-kurso, IEK-prelegaro laŭ OSIEK, kongreso de blindaj esperantistoj de LIBE, la 46a Renkontiĝo de Esperanto-Familioj kaj la 6a Verda Naturisma Semajno. Baldaŭ okazos: la Esperanto-koruso INTERKANT kaj la 14-a kursaro AŬTUNAS. Legu pli en *La Ondo de Esperanto:* **https://sezonoj.ru/2025/10/francujo-29/** kaj aliĝu!

## Legu pri la brito Stead

Ĉu vi konas la britan raportiston **William Thomas Stead**, unu el la pioniroj de profesiaj ĵurnalistoj en la mondo, kiu ankaŭ fariĝis esperantisto? Vi malkovros lian fascinan vivon kaj kiel lia spirito de internacia kompreniĝo kondukis lin al nia lingvo:
https://uea.facila.org/artikoloj/homoj/stead-raportisto-kaj-esperantisto-r491/

**Verkinto kaj voĉleginto:** Terry Page. La artikolo haveblas por **legi kaj aŭskulti** — do ĝi estas tre utila por ĉiuj, kiuj volas samtempe ĝui interesan legadon kaj plibonigi sian komprenon de la parola Esperanto.

https://uea.facila.org/vortlisto/

## Kalajdeskopo de Lingvoj

La 27-an de septembro 2025 en la centra biblioteko de la urbo Odincovo (Moskva regiono, Ruslando) okazis la tria Kalejdoskopo de lingvoj. Legu prian artikolon de Irina Gonĉarova kiu aperis en la aŭtuna eldono de La Ondo de Esperanto https://sezonoj.ru/2025/10/ruslando-70/.

## Virinoj aktivas

La 25-an majo 2024 la Estraro de UEA aprobis la kreadon, lanĉon, naskiĝon de Komisiono por Virina Agado. Tiu kvinpersona grupo el kvar kontinentoj kunvenadas per la Reto kune kun 5 konsilantinoj. En sia kunsido de la 8-a de septembro 2025 ili decidis pri gvidlinioj por sia agado :

1. Grupigi kaj kunlaborigi virinojn.
2. Kolekti kaj konigi informojn pri virinaj vivkondiĉoj.
3. Kapabligi virinojn en diversaj kampoj.
4. Kreskigi respekton al knabinoj kaj virinoj.
5. Serĉi kontaktojn kun naciaj virinaj grupoj.

Detaloj pri legeblas enka Esperanto-Vikipedio : Komisiono pri Virina Agado - Vikipedio

Iuj personoj, kiuj volas partopreni, esprimi sin, rakonti pri sia vivo, povas kontakti la Komisionon uzante jenan adreson : virina-agado@groups.io.

Iuj personoj, kiuj volas subteni la Komisionon en sia agado povas ĝiri sumon, sumeton, sumegon, al la ĝenerala kaso de UEA kun mencio : por la Komisiono por Virina Agado.

Nome de la Komisiono : Mireille Grosjean

. ========= vortoj: 1315 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Kvardek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.